# BULTENO
# DE ESPERANTISTA KLUBO
# EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA n-ro 3/1986 julio 1986

La membrino de nia klubo, konata Esperanta poetino

s-anino E l i U r b a n o v á

fariĝis membro de la Akademie de Esperanto. La elekto okazis la 16-an de aprilo. Eli Urbanová kune kun Marjorie Boulton estas nun du virinoj inter la akademianoj kaj kun Karolo Piĉ du reprezentantoj de nia lando en la Akademio de Esperanto. Ni kore gratulas!

## J E P R O S P E R O D E L' H O M A G E N T O

estis titolo de la ekspozicio, kiun lanĉis dum la monatoj aprilo kaj majo la praga Karlo-universitato en la ĉarma kruckoridoro kaj apudaj salonoj de la gotikstila konstruaĵo "Karolinum".

La ekspozicio prezentis koncize al alvenintoj historion de la universitato, ties evoluon, la hodiaŭan ampleksan instru- kaj scienclaboron kaj la akiritajn sukcesojn.

Do, mi invitas vin, bonvolu eniri:

Afable ridetante bonvonigas vin la prilumigita plastikaĵo de Karlo la IVa kaj jena sciigo:

KARLO
pro dia graco reĝo roma
ĉiam plimultiganto de regno
kaj la ĉeĥa reĝo

Por ĉiama memoro ....

Precipe sopiras koro nia kaj eksterordinara zorgemo daŭre premas reĝan menson nian kaj ĉefe al tio spirito nia tumas atenton sian, ke nia regno ĉeĥa, kiun super aliaj honorigoj kaj posedaĵoj, aŭ heredaj aŭ feliĉe akiritaj, en pli granda favoreco de nia menso ni tenas, pri kies altigo kun ĉiu ebla diligento ni zorgas kaj al kies honoro kaj bono ĉiun nian penadon celas, ke tiu ĉi regno, same kiel ĝi pro dia vole de naturo ĝojas pro abundo de nutraĵo korpa, ĝi estu laŭ ordono de nia antaŭzorgemo dum niaj tempoj arte omamita per granda nombro da saĝaj viroj, por ke niaj fidelaj reĝolandanoj, kiuj senĉese avidas je fruktoj de scienco, ne devu en fremda lando almozpeti, sed por ke ili trovu en sia reĝolando tablon regalpreparitan kaj ke tiuj, kiujn talente eminentiĝas, per denaska kompreno, fariĝu per kono de sciencoj kleraj kaj ne nur, ke ili ne plu

estu devigataj, sed eĉ superflua jam ili povus konsideri, por elserĉi sciencojn mondorandon ĉirkaŭiri, al fremdaj popoloj vojiradi, aŭ por ke ilia avido kontentigita estu, en nekonataj elpetadi regionoj, male, ke ili konsideru sia gloro, ke ili povas aliajn el fremda lando inviti al placo de bonodoro kaj partopreno al tia danko.

Tial, por ke tiel utila kaj laŭdinda ekago de menso indajn fruktojn donu kaj ke la ekscelentigo de tiu reĝolando plialtigita estu per ĝojigaj komencaĵoj de nova afero en nia ĉefa kaj plej gracia urbo praga, kiu kaj pro riĉo de rikolto tera kaj pro ĉarmo de la loko nacia, supermezure per tia grandioza tasko kapabla estas, ni post medito serioza decidis eklevi, aranĝi kaj nove instali ĝeneralan altlernejon.

En altlernejo tiu estos doktoroj, majstroj kaj lemantoj de ĉiuj fakultatoj.

Al ili bonegajn profitaĵojn ni promesas kaj al tiuj el ili, kiujn ni indaj konsideros, reĝajn donacojn donos.

Doktorojn, majstrojn kaj lernantojn de kiu ajn fakultato, ĉiujn kaj ĉiun aparte, sendiference de kie ili devenas, kaj survoje ĉi tien, kaj dume ili ĉi tie restos, eĉ se ili de ĉi tie reeniros, ni volas sub speciala ŝirmo kaj protekto de nia glorado teni kaj al ĉiuj firman garantion ni donos, ke la privilegioj, rajtoj kaj liberoj, kiujn el reĝa povo uzas kaj partoprenantaj estas doktoroj kaj lemantoj en altlernejoj en Parizo kaj Bolonjo, al ĉiuj kaj ĉiu, kiu ĉi tien volus veni, ni malavare donos kaj prizorgos, ke liberoj tiuj, de ĉiuj kaj ĉiu estu senŝange konservitaj.

Kaj pro konscio kaj plia certeco de ĉio ĉi ni lasis ĉi tiun dokumenton pretigi kaj per ora Buleo kun signo de nia majesteco ni ĝin ordonis sigelfermi.

Donite en Prago, la Dijaron mil tricent kvardek okan

en la unua indico, la 7-an de la monato aprilo,

de reĝeco nia la jaron duan,

Plu irante, vi povas admiri brilantajn, orajn kaj arĝentajn universitatajn insigniajn sceptrojn, omamitajn per fakultataj emblemoj kaj gemoj. Ili devenas el la 19a jarcento, ĉar la barokaj el la 16a jc. malaperis dum la 2a mondmilito.

Tuj apude ni kortuŝe rigardas la bildon de la plej eminenta antaŭulo nia – majstro Jan Hus kaj legas la faman mesaĝn:

IOAN HUSSUS BOEMUS

Pri tio mi kontinue zorgas, ke la vivodona universitato nia sen ekzercoj en sciencoj ne fariĝu nefruktodona, male, ke disfloru admirinda sprito de majstroj kaj la junulaj koroj estu instigataj okupi sin per sciencoj.

Plej respektindaj majstroj estu viroj bravaj, estu unuanimaj en vero, kuraĝe instruante veron. Ne timu la malamikojn de vero, amu vin reciproke, instruu junularon!

Kaj vi, plej ŝatataj lernantoj, evitu malvirtojn, disputojn, ĵaluzojn. Obeu en aferoj permesitaj siajn majstrojn, estimu ilin kiel viajn patrojn! Ĉar tiamaniere kreskos la dia gloro en la popolo, ekĝojos la komunumo de ĉeĥa regno, ekbrilos la urbo Prago kaj super aliaj universitatoj abundos la Praga Universitato per scioj kaj virtoj.

Majstro Jan Hus

(En la jaro 1409 li meritis ĉe reformo de la Universitato per "Kutnohora Dekreto" kaj la saman jaron li estis elektita rektoro.)

Kaj apude kaj vid-al-vide, ĉie vitrinoj, bildoj, fotaĵoj, libroj, paneloj kun mezepokaj historiaj dokumentoj, kiuj konatigas nin kun la ekesto kaj komenco de nia Alma Mater.

La vitrinoj kun pli novaj historiaĵoj estas ne malpli interesaj. Kiu ne admirus la disertaĵon de Karel Čapek, prof. Heyrovský – nia unua Nobel-premíita sciencisto (1959), kies Nobel-premion kaj polarografon ni povas ankaŭ rigardi. Ni povas miri super modestega subskribo de Albert Einstein, kiu akiris profesorecon kaj instruis du jarojn (1911-12) en nia universitato.

Kaj jen! Fotaĵo de societo partoprenanta al la radiologa kaj rentgenologa kongreso 1925 j. en Prago, kie apud la fondinto de la ĉeĥa rentgenologio kaj radiologio, prof. Jedlička, sidas sinjorino Maria Curie-Sklodowska!

Kaj plue enskribaĵoj, modeloj el la deksesa kaj deksepa jarcentoj, portreto de la fama profesoro pri fiziologio Jan Evangelista Purkyně, ktp. ktp. – kiom da famaj nomoj!

Sed jam proksimiĝas la danĝera tempo de faŝisma jugo antaŭ kiu avertas multaj saĝaj kaj progresemaj, i.a. MUDr. Vladislav Vančura, en Universitataj periodaĵoj de la tridekaj jaroj – vane, la fata cirklo fermiĝas per jena

AFIŜO

Kvankam estis refoje serioze avertite, provas de ia tempo grupo da ĉeĥaj intelektuloj, kunlabore kun rondoj de elmigrintoj en fremdlando, per pli malpli grandaj agoj de rezisto malkvietigi trankvilon kaj ordon en Protektorato Böhmen und Mähren. Ĉe tio estis eksciite, ke la iniciatoj de ĉi tiuj agoj de rezisto estas ĉefe ankaŭ en ĉeĥaj altlernejoj.

Ĉar tiuj ĉi elementoj lasis sin dum la tagoj 28a de oktobro kaj 15a de novembro allogi por perfortaj agoj kontraŭ unuopaj germanoj,

estis ĉeĥaj altlernejoj por la tempodaŭro de tri jaroj fermitaj,
naŭ agantoj mortpafitaj
kaj pli granda nombro da partoprenintoj enkarcerigitaj

En Prago, la 17-an de novembro 1939

Der Reichsprotektor in Böhmen und Mähren
gez. Freiher von Neurath

(Pli granda nombro = 1200 studentoj kaj profesoroj en koncentrejo Sachsenhausen. En la jaro 1941 estis la tago 17-a de novembro proklamita Internacia Tago de Studentoj.)

Sed la tempo kompate pasas kaj la universitato leviĝas el la cindro de siaj mortintoj kvazaŭ fenikso, sed ĉiam al pli granda gloro, profetita de Karlo la IVa.

Apud memoraĵoj pri liberigo de nia ŝtato komenciĝas la plua parto de la ekspozicio kaj dé la superba gotika koridoro per prezento de la hodiaŭa stato de la altlernejo, kiu nun konsistas el la

| fakultatoj pri | fondita en la jaro |
|---|---|
| ĝenerala medicino | 1348 |
| filozofio | 1348 |
| juro | 1348 |
| natursciencoj | 1920 |
| pedagogio | 1945 |
| matematiko-fiziko | 1952 |
| infanmedicino | 1953 |
| higieno | 1953 |
| medicino (en la urbo Hradec Králové) | 1958 |
| medicíno (en Plzeň) | 1959 |
| sporto kaj korpedukado | 1966 |
| farmacio (en Hradec Králové) | 1969 |
| ĵurnalistiko | 1972 |

Se oni konsideras la hospitalojn, plej modernajn laborejojn kaj esplorinstitutojn, apartenantajn al la universitato, oni povas imagi ties ampleksecon. Kelkajn eble interesos, ke ĉe la fondiĝo (1348 j.) formis la "ĝeneralan altlernejon" nur 4 fakultatoj, tiuj pri medicino, juro, arto kaj teologie. La lasta estas hodiaŭ memstara altlernejo. Sed ni revenu al la paneloj kaj informu nin almenaŭ supraĵe pri la solvoj de scieccesploraj taskoj kaj grandnombro de eltrovoj kaj proponoj de plibonigoj, realigitaj dank' al la universitatanoj kaj studentoj. La sciencesplora agado ofte celas solvi taskojn el plej gravaj naciekonomiaj fakoj. Interesaj ankaŭ estas la sciigoj pri kunlaboro kaj kontraktoj kun eksterlandaj altlernejoj kaj fremd-landanoj studantaj ĉi tie, kio rilatas kaj orienton kaj okcidenton. En la jaro 1985 elpaŝis novaj

kuracistoj 966
pedagogoj 880
juristoj 683
natursciencistoj 433
aliaj 789 altlerneje kvalifikitaj en aliaj fakoj.

Konsideru, ke Karlouniversitato estas la plej fama, sed ne unusola universitato en nia respubliko, kaj imagu, kiom da kleraj homoj ĉiujare komencas praktikon.

Kaj ni irante plue ĝojas pro la superbaj gotikaĵoj, la altgusta aranĝo de la ekspozicio, jen, vidu la ĉarman statuon de Athéna Lemnia kaj ni eniris longan koridoron, kies maldekstra parto abundas per montraĵoj de la eldonagado de la universitato. Plej variaj publikaĵoj, lernolibroj, sciencaj verkoj de unuopaj fakultatoj atestas pri ties sukcesoj. Kaj la dekstra parto estas dediĉita al medicino. Komence ni kortuŝiĝas super vitrino kun mezepokaj ujetoj, iletoj, pesiletoj ktp., por ke ni tuj apude ĉion povu kompari kun veraj mirakloj de la hodiaŭa povo, kono kaj eblecoj de kuracistoj, ĉar propramane vi povas tuŝi la ekipon de operaciejo, inkluzive la plej modernajn aparatojn, instrumentojn, ĉio klarigita per bildoj kaj surskriboj. Plej ŝatata estas la komputilo kun programo de mezuro de la korpa temperaturo, kio okazas per simpla tuŝeto de pikilo kaj rigardo sur ekrano. Kvazaŭ ludilo, sed en hespitaloj certe servas ne por ludi. La plej admirata en ĉi parto estas la lumpanelego, kie senĉese sinsekve lumas bildoj: pri aŭtoaverio, mano apartigita de brako, operacio, la mano aloperaciita al la brako kaj la lasta bildo — la sendifekte funkcianta mano tenanta objekton. Miraklo? Jes, sed ankaŭ fakto. Kaj plej ŝatata de junularo ilo kiu amuzmaniere precize sciigas pri viaj reagokapabloj. Kaj aliaj iloj, maŝinoj, laseroaparatoj, mikroskopoj ktp. ktp. Kaj jen! Vitrino kiun neniu preterpasas, la Nobelpremio de prof. Heyrovský kune kun la polarografo. Ne mankas lia busto. Amindekoloraj estas diversaj ŝimoj kaj utilaj kaj danĝeraj, interesaj estas montraĵoj instalitaj en mikroskopoj. Estas eĉ angulo pri mediprotektado. Bone amuziĝas la vizitantoj en apudaj salonetoj, kie estas instalita projekciado de la filmo pri fondiĝo de la universitato kaj ties evoluo kaj en la dua oni povas per ultraviolaj radioj esplori siajn monbiletojn kaj dokumentojn, ĉu ili ne estas falsaj, aŭ sur ekrano legi tekstojn el mikrofilmoj.

Ege interese estas observi la vizitantojn. Fakuloj paŝas rekte al "sia" ekspoziciaĵo, kleravidaj homoj precize trarigardas kaj admiras ĉion, estas ankaŭ tiuj, kiuj ekzemple studas la artefaritajn artikojn, havante ilin en siaj korpoj, tiuj kun malsana koro longe rigardas la kardiostimulatoron kun funkcianta modelo de koro kaj la adekvata ekrano. Sed ili ĉiuj havas ion kunan: elirante ili ridetas feliĉe kaj dankas, multaj enskribas sian entuziasmon en la kroniklibron. Ĉar ili konvinkiĝis ke ĉio, kion entreprenas la universitato,"servas je prospero de l' homa gento.

Helena Štruncová

---------------------------------------------------------------------------------------------------------------------

## E L   H E J M A J   T A S K O J   D E   N I A J   K U R S A N O J

### Unu el miaj interesoj

Dum mia libera tempo vintre mi ŝatas legi, ankaŭ mi aŭskultas radion kaj ĉe tio brodas aŭ trikas ion.

Sed somere mi laboras kaj ripozas en mia malgranda ĝardeneto. Mi havas tie unu prunujon, unu pirujon kaj kelke da pomujoj-nanoj. Sub la arbetoj verdiĝas la herbo-bedeto, kiun mi devas ofte falĉi. Mi havas tie ankaŭ bedeton de tutsomere fruktodonaj fragoj. Sur la herbobedoto kaj ĉe la prunujo staras la malgranda kabaneto-budo. Antaŭ ĝi mi kulturas buntajn somerajn florojn, kiuj plaĉas al mi plej multe. Printempe mi plantas semetojn kaj plantidojn kaj mi akvumas ilin, observas kiel kreskas la plantetoj, kiel kreiĝas la florburĝonoj kaj el ili la floroj. Sur la bonodoran kaj koloran tapiŝon de floroj alflugas abeloj, burdoj kaj buntaj papilietoj. Sur la arbojn eksidas la birdoj kaj konstruas al si la nestojn. La paruoj postulas ankaŭ arakidojn de ni. En la daŭro de la somero mi kun ĝojo observas ĉion kaj zorgas pri ĉi tiu peceto de la naturo.

Aŭtune ĉio denove prepariĝas por la vintra trankvilo kaj dormo.

Křesinová

### Letero al amiko

Kara arniko,

en la lasta letero vi skribis al mi pri via hobio - fotografado. Ankaŭ mi havas mian hobion. Ĝi estas kuirado.

Je la plej granda ĝojo de mia edzino mi stariĝas dimanĉe al la forno kaj komencas sorĉi. Mi preparas la matenmanĝon. Kuirado de teo kaj kafo estas nur antaŭekzerco. Por tio mi eĉ ne prenas antaŭtukon. Sed poste. Koncentrita preparo de la tagmanĝo postulas helpon de ĉiuj familianoj. La edzino preparas viandon, la filino supon, la filo terpomojn kaj mi, mi memkompreneble kuiras. Post la tagmanĝo mi havas pluan gravan taskon. Kiam la filino kun la panjo lavas vazaron, mi malfermas la bieron.

La vespermanĝo jam ne estas tiel festa. Ni manĝas pli ofte ion malvarman. Sed al ĉiuj ĉio bongustis. Ĉar ĉiuj helpis. Tio estas la sorĉa atmosfero de la dimanĉa tago ĉe ni hejme.

Mi ĝojas je via venonta letero, kaj ke mi ne forgesu, memkompreneble mi sendos al vi tiun la plej bonan recepton pri la bretoniaj fazeoloj.

Kore salutas vin via

Inĝ. Veselý

---

Por nia sano

### Finaj vortoj

En kelkaj numeroj de Bulteno vi havis eblecon legi kelkajn artikolojn kun la atentigoj aŭ rekomendoj kiel sane nutri vin kaj kio povas influi entute nian sanan vivon. Kompreneble, ne estis eble priskribi ĉion. La intenco estis koncize mencii kelkajn punktojn por pripenso.

Nun vi mem devas pripensi, kion permesas via sanstato, ĉu vi opinias, ke ankaŭ vi apartenas inter la korpulentajn. Vi mem devas decidi ĉu vi komencos kun la negativa energetika bilanco. Ĉiu havas aliajn kondiĉojn. Kaj fine vi devas decidi, ĉu sufiĉas al ví forta, volo, aŭ ĉu vi bezonas serĉi motivon.

La literaturo, kiu rilatas al tiu ĉi temo, estas nun jam sufiĉe abunda. Vi povas elekti literaturon pli profundan, pli fakan, eĉ literaturon sciencan. Tie vi trovos necesajn faktojn kaj rekomendojn. Sed atenton, nur la literaturo ne sufiĉas.

Do, mi ne plu priŝtelos vian tempon, dediĉu ĝin al via sano.

Ondráček

Konciza sciigo

La ĵurnalo Rudé právo lundo la 12-an de majo aperigis koncizan informon: "La unuan premion en la internacia kantokonkurso de infankorusoj en belga Neerpelt kaj la premion de belga ministro de lernejoj gajnis la infana kantkoruso Radost (Ĝojo) Prago, Distrikta Domo de Pioniroj kaj Junularo en Prago 7." Ni scias, ke nia vicprezidanto s-ano Ondráček havas 2 infanojn, kiuj jam kelkjare kantas en ĉi tiu koruso. Sed malmultaj scias, ke antaŭ nelonge ni ricevis de la internacie premiita kantkoruso belege kantatan surbendigitan Esperanto-himnon, pri kio nia klubo nun povas fierigi. Ni elkore dankas al la infanoj kaj ilia direktanto pro la afablo.

H. Štr.

80-jara esperantistino en Lidice

La 8-an de aprilo 1986 ĝisvivis 80 jarojn s-anino Růžena Lišková-Vyžvaldová, virino, kiu sukcesis transvivi la terurojn de naziaj koncentrejoj, la ekzekuton de sia unua edzo (Liška) kaj la forrabon de sia fileto Mireček. Ŝia patrino Marie Nováková, esperantistino en Lidice, pereis en la koncentrejo Oświecim (1944-11-25). Sian duan edzon, Vyžvalda, ŝi ekkonis en la Somera Esperanto-Kolegio en Doksy en 1948. "Ligis nin reciproke tiom da komunaj interesoj – ĉefe Esperanto", ŝi skribis al mi. "La morto de mia edzo (en 1985) estis tro kruela bato por mi. Mi estas dankema, ke vi tiris min per via letero el miaj dolorplenaj pensoj, kiuj min daŭre persekutas, – al la estinta interesigo – Esperanto."

Gratulante postfeste al s-anino Růžena Vyžvaldová ni deziras al ŝi plenan konsoliĝon.

J. Mařík

Porblindula kampanio organizata de D-ro Horský

En la pasintjara novembra numero de nia Bulteno ni informis, ke la membro de nia klubo D-ro Rudolf Horský kolektas malnovajn okulvitrojn kaj sendas ilin en Afrikon (Ganon), kie oni rebonigas ilin kaj disdonas al malriĉaj malbone vidantaj homoj. La artikolo havis vastan reeĥon ankaŭ en la neesperantista publiko, pri la bonfara agado de D-ro Horský raportis la 4-an de marto la radio en la vespera programo Kolotoč (Karuselo) kaj ankaŭ la revuo Naše rodina (Nia familio) n-ro 4/1986. Rezulte de tio D-ro Horský ricevis tiom da malnovaj okulvitroj, ke estas preskaŭ super la homaj fortoj forsendi ilin, oni devas paki ilin en 10-kg-pakojn sub dogana kontrolo. Ĝis nun D-ro Horský forsendis 20 mil okulvitrojn, en Gano ricevis okulvitrojn de la esperantista help-kampanjo jam 100 mil personoj. Grava problemo estas la postelspezoj. La forsendo de pakaĵoj estas tre multekosta afero, ĝis nun D-ro Horský sukcesis aranĝi, ke la elspezojn pagis Ekumenia Konsilataro de Eklezioj, sed estas necese akiri novajn monrimedojn. Ruĝa Kruco ilin ne havas. Tial estas necese, ke ĉiu donacanto de malnovaj okulvitroj aldonu ankaŭ malgrandan sumon per postelspezoj! Nun la Radio surbendigis intervjuon kun D-ro Horský pri la porblindula kampanjo.

D-ro Zázvorka en la Radio

En la matena programo "a léta běží" (kaj la jaroj pasas) la 15-an de majo la Ĉeĥoslovaka Radio elsendis rakontadon de RNDr. Vlastislav Zázvorka, CSc., 83-jara laboranto de Nacia Muzeo, kaj dum multaj jaroj direktoro de Nacia Muzeo, membro de nia Klubo. Li rakontis pri siaj fakaj kontaktoj kun eksterlandaj sciencistoj kaj li diris, ke por tio li uzis ankaŭ Esperanton. Ni gratulas al D-ro Zázvorka kaj deziras al li firman sanon!

Zedniková

La someraj kunvenoj de nia klubo

havas ĉiam libervolan programon. Ni kunvenas ĉiulunde je la 18.30 h en la klubejo en Zahradní Město, en Malinová-strato n-ro 25. Ofte venas inter nin eksterlandaj gastoj. Venu ankaŭ vi!

Paca ekspedicio en Prago

La paca ekspedicio trairanta diversajn landojn de Eŭropo venos en Pragon la 8-an de julio kaj je la 16.00 h okazos manifestacio sur la Malnovurba Placo. Venu amase kaj venigu viajn konatojn!

Donaco de s-ano Howard

S-ano Richard Howard donacis al nia klubo 50 kronojn. Koran dankon!

---

BULTENO de Klubo de Esperantistoj en Praha (loka grupo de ĈEA), p.k. 1069, 111 21 Praha 1. Redaktas: Kultura komisiono ĉe la komitato de la Klubo de Esperantistoj en Praha.